

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ **Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E.** ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. CL. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS  
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE  
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE  
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 11, cours Léopold 54042 - NANCY Cédex  
C. C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.  
Française

==== la n°: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. =====  
XX

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de  
marto, junio, septembro kaj decembro.  
XX

---- N° 125 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

----- JULIO 1980 -----

XX

## BILETO DE LA PREZIDANTO.

Pénétrés par l' ardeur de l' Esprit-Saint, en ce jour de Pentecôte, les apôtres quittent soudain le Cénacle où les avait retenus le sentiment de leur faiblesse après le drame de la Croix, et malgré l' espérance que le Christ ressuscité leur avait léguée avant de retourner vers le Père. Et voici que leur parole enflammée est comprise de ceux qui emplissent la ville sainte, juifs, prosélytes et païens venus de toutes les nations vers le Temple. Ils entendent l' annonce de la Bonne Nouvelle, qui va se répandre à travers le monde "jusqu' aux extrémités de la Terre", et en changer profondément la face.

Et voici qu' en notre temps, marqué par le doute, obscurci par les faux prophètes, un nouvel apôtre parcourt le monde. Loin du temps où la Pape exerçait une souveraineté temporelle disputée par les empereurs et les princes, loin de celui où il fut prisonnier volontaire du Vatican, un Père des Chrétiens, pontife aux mains libres, parcourt le monde, lançant aux foules étonnées le message de l' Evangile.

Il n' attend pas qu' on vienne à lui: il s' adresse au peuple comme à ses pasteurs, montre aux chrétiens ce qui peut les réunir en un même peuple de Dieu, aux croyants la primauté du spirituel, à tous la valeur suprême de l' être humain, qu' il se réfère à une éthique basée sur la justice et la paix, ou qu' il reconnaisse sa dignité éminente dans le plan divin.

Il y a une rencontre évidente entre l' esprit qui anime le monde des espérantistes avec, notamment, les paroles de Jean-Paul II prononcées devant l' assemblée de L' Unesco. Notre mouvement rassemble, par-dessus les frontières, des hommes que rapproche la recherche du progrès humain dans les domaines les plus divers, tels que l' art, les sciences, les techniques, et dont la communication directe est rendue possible par un langage commun.

Pour nous, qui voulons avant tout servir les valeurs morales et spirituelles, nous sommes par vocation les témoins et les messagers de la conception de la dignité de la personne humaine telle que Jean-Paul II l' a proclamée, au cours de ses voyages, au nom de Jésus-Christ.

../...



LINGVA ANGULO

Venis tradukproponoj de S-ino MICHAU (M), S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DE SALVO (De), LE MARQUAND (L) kaj RIBOT (R).

- 1) finir en beuaté: apogee finiĝi, glorege morti (B); havi honoran finon (Da); havi mirindan finon (De); bele, brile elfiniĝi (L); plej belece finiĝi (M); tri-umfe finiĝi (R).
- 2) flairer anguille sous roche: flarsenti diablon en la skatolo, serpenton sub la herbo (B); kvazaŭ konscii pri vipuro sub la herbo (Da); antaŭflari trompaĵon (De); flari kaŝitaĵon (L); percepti kaŝitaĵon (M); suspekti ion nenormalan, angilon subroke (R).
- 3) à la fleur de l' âge: en la florado de la vivo, en la printempo de la vivo, en la plej bela aĝo (B); en plena juneca epoko (Da); en aĝoviglo (De); ekadolekante (L); je printempo de l' vivo (M); ĉe l' printempo de la vivo (R).
- 4) faire la foire: diboĉeti (B, Da); vivi en diboĉaj plezuroj (B); ĉiumaniere amuziĝi (Da); ĉue festeni (De); freneze diboĉi (L); diboĉi (M, R); petole kondukti (R).
- 5) foncer dans le brouillard: impete entrepreni, spontane iniciati (B); plej rapide, senhezite, agi (Da); tranĉi la nebulon (De); tranebule rapidegi, senpripense hasti (L); impete ekiri, kuraĝe alfronti (M); senpripense rapidi al celo (R).
- 6) fondre comme un aigle: kurataki kiel aglo, agle sturmi (B); fulmorapide ataki, kvazaŭ aglo (Da); subite sin ĵeti, alveni (De); agleske pezimpeti (L); aglece ataki (M); kiel aglo flugi celen (R).
- 7) le fin mot: la kaŝita kialo (B); la kaŝita kerno (Da); la kerno (De); la ekzakta klarigo (L); la vera kialo, la konkludo (M); la ŝlosilvorto (R).
- 8) à la force des poignets: per propra penado, ŝvito (B); nur per sia propra forto (Da); perbrake (De); nur per pojna forto, nur per propraj fortoj (L); per siaj propraj fortoj, propramerite (R).
- 9) foncer comme un bolide: impetegi, rapidegi kiel raketo (B); fulmorapide kuri (Da); fulmrapiide sin ĵeti (De); bolide impetegi (L); bolidsimile veturi (M); rapidegi kiel bolido, bolide rapidegi (R).
- 10) faire flèche de tout bois: pafi ĉion atingeblan, uzi ĉian ajn rimedon (B); uzi ĉiun eblan rimedon (Da); provi ĉiujn rimedojn (De); profiti ajnajn okazojn (L); saĝaĉe ĉion utiliĝi (M); kontentiĝi je ĉio (R).

Tria klasifiko: 1) S-ro RIBOT (19 p.); 2) S-ro DAUCHEZ (14); 3) S-ino MICHAU (13); 4) S-ro LE MARQUAND (12); 5) S-ro BOURGOIS (11); 6) S-ro DE SALVO (2), 7) S-ro GUILLON (1).

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois: 1) être en fonds; 2) forcer le destin; 3) cette histoire est gorgée de toutes pièces; 4) en son for intérieur; 5) il va faire du foin! 6) il peut toujours se fouiller! 7) il n' en fiche pas une ramée; 8) il s' en fiche royalement; 9) nous voilà frais! 10) faire les frais de la conversation.

=====  
NIA MEMBRARO

Novaj membroj: 7) S-ro THIEBAUD (Hte-Saône); 8) S-ro DEBERTONNE (Yvelines); 9) F-ino POIGNANT (C-d' Or).

Nova dumviva membro: 46) S-ro DEBERTONNE.

KORAN BONVENON AL ILI!  
=====

NEKROLOGO

Ni preĝu por la animripozo de S-inoj Preux kaj Vanneau, patrinoj de niaj ŝatataj komitatanoj; kiuĵ reiris al la Domo de la Patro.





RADIO ROMA - ESPERANTO (teksto de Bianchi, trad. De Salvo)

### LA VOJAĜO DE LA PAPO AL AFRIKO

La longa vojaĝo al Afriko de Johano-Paŭlo II-a, kiu finiĝis la 12-an de majo, estis komentita kun granda reliefo de la italaj ĵurnaloj.

"Il Corriere della Sera" skribis, ke "bilanco de la vojaĝo de Papo Wojtyla ne povas ne inkluzivi lian severan kritikon de la okcidentaj mitoj, ĉar li eniĝis en la afrikan realon kun spirito tute pura el la okcidentaj principoj kaj antaŭjuĝoj, kaj plurfoje li instigis la afrikanojn konservi siajn bonajn tradiciojn, kiuj ofte harmonias kun kristanismo pli ol tiuj de multaj okcidentaj eklezioj, kiuj kelkfoje iĝis nur etaj insuloj en maro de laikeco, kun tre akraj pintoj de kontestado. Post la finiĝo de la longa rondveturo, eblas konfirmi la celojn de la vojaĝo: ĉefe, diri definitivan vorton koncerne la rilatojn inter kristanismo kaj afrika kulturo: ĉi tiu vorto estis "jes" al la afrikaj tradicioj, kondiĉe, ke ili ne estu en kontrasto kun la roma doktrino".

"La Stampa", sub la titolo "Katolika negreco", skribis, ke "la vojaĝo de la Papo al negra Afriko atentigas nin pri unu el la plej seriozaj problemoj, kiujn la Eklezio devos solvi, por kiu eble eĉ ne sufiĉos la ne malproksima dudekunua jarcento. La problemoj estas kompleksa, ĉar ekzistas en Afriko negra malplimulto konvertiĝinta al kristanismo, parte pro la agado de la katolikaj misiistoj kaj parte pro la agado de tiuj evangeliaj. Kaj ankaŭ ekzistas islama Afriko, fronte al kiu ĉia religia propagando estus senrezulta".

"Il Tempo" emfazis, ke "Johano-Paŭlo II-a, ĉe la fino de la vojaĝo tra la nigra kontinento, resumis siajn impresojn dirante, ke tuta Afriko estas granda konstruejo, riĉa de promesoj sed ankaŭ de riskoj. La bildo, per kiu la Papo sin esprimis, ne povus esti pli celtrafa".

"L' Unità", organo de la itala komunista partio, substrekis, ke "al la afrikanoj, Johano-Paŭlo II-a rekomendis, ke ili pruvu, ke ili kapablas solvi siajn problemojn, akceptante la daŭre utilan helpon (bonfaran, ekonomian kaj kulturan), sed zorgante, ke tiu helpo estu orientita al bona celo, kaj ne atencu al la originala afrika civilizo fronte al tiu moderna".

Ankaŭ "L' Avanti", organo de la itala socialista partio, skribis, ke "Papo Wojtyla, ĉe la adiaŭ al Afriko, invitis la loĝantojn de tiu kontinento ne imiti difinitajn fremdajn modelojn, sed esti si mem".

Fine, "Il Popolo", organo de la itala kristandemokrata partio, emfazis, ke "la Papo forlasis Afrikon kun virtoj de espero kaj kun la koro plena de profunda kaj facile komprenebla melankolio. Al la junaj kristanoj, la Papo rekomendis, en sia adiaŭa mesaĝo, ke ili estu atentaj fronte al la modeloj de socio baziĝanta sur egoisma serĉado de la individua bonfarto aŭ sur la klasbatalo kaj la perforto. Materialismo, diris la Papo, estas iu formo de malaltiĝo de la homo kaj de servutiĝo de la socia vivo".

### SANKTA FRANCISKO KAJ EKOLOGIO (teksto de Paola Randone, trad. De Salvo)

Ekde ĉi tiu jaro, S-ta Francisko el Asizo ne estas nur patrono de Italio; li ankaŭ fariĝis tutmonda patrono de "ekologio". Tion decidis la Papo, per latinlingva buleo, en kiu oni parolas pri la senfina amo kaj la sindediĉo, kiun S-ta Francisko ĉiam montris al la naturo kaj al la kreitaĵoj, kaj pri kiuj atestas la famkonata "Kantiko de la kreitaro": "Laŭdata Vi estu, Sinjoro, kun ĉiuj viaj kreitaĵoj, precipe sinjoro frato Suno ... fratino Luno kaj lasteloj ... frato vento.. fratino akvo ..."

=====  
"HEROLDO" fariĝis 60-jara.

En aprilo 1920, aperis en la vilaĝo Horrem apud Kolonjo (Germanujo) la unua numero de la sendependa internacia gazeto "Esperanto Triumfonta", kiu kelkajn jarojn poste alinomiĝis "Heroldo de Esperanto".

La 14-an de aprilo 1980 aperis la 1664-a numero de "Heroldo de Esperanto", kiu daŭre estas la plej ofte aperanta internacia Esperanto-gazeto.

Detala historio de "Heroldo" ĝis 1962 estas priskribita en la biografia libro de Teo Jung "Ĉiu ĉiun", aperinta pasintjare ĉe la eldonejo TK/Stafeto, Schoten.

AGROKULTURO

Lando, tra kiu fluas la akvo kaj mielo,  
Tiel flue falas pluv', tiel varme ardas sun',  
Krom vintre, dum printempo kaj somero eĉ aŭtun',  
Varie naskas tero per manoj de Habelo!

Jen hordeo, tritiko, jen spelta por muelo:  
Tuj bakiĝos krusta pan' el la tutfreŝa farun'  
Por manĝo plej frateca, Milia blanko aŭ brun'  
Mikskoloras sur kampoj loke de Israelo.

Apude kreskas cepoj, melonoj kaj poreoj  
Kaj vidiĝas en mezo la kukuma veluro;  
Kun la lentoj batalas fazeolaj armeoj.

Maturiĝas granatoj. Kaj la vintra susuro  
Alvokas al la vino dum tre dolĉaj oleoj  
En olivoj pretiĝas: Bena agrokulturo.

17/2/1978

AGUR

Fakte unu ĉapitron li verkis en Biblio:  
Vere tio ne grandas inter multaj sentencoj,  
Sed oni povas lerni el liaj konfidencoj  
Pri Dio, eĉ dungitoj, bestoj kaj familio.

Ĉiu javea diro puras kiel lilio:  
Li estas ŝirma ŝildo pro siaj fortpotencoj;  
Ne malfidu mensoge; ke liaj providencoj  
Alportu la neceson sen aldonita plio.

Por ne ŝperti malbonon, gardu respekton al sklav';  
Ne imitu hirudon, kiu sed ŝedasimile  
Neniam ĝissatiĝas kiel akvo, kiel glav'.

Pri la aglo, pri serpent', pri formiko utile  
Li vortis, ĉio pri cervo. Fine prelegis kun rav'  
Pri patro kaj patrino moŝta Agur flugile.

18/2/1978

=====

PRI "Une langue internationale pour le monde et pour l' Eglise"

"C' est un livre parfait que chacun des vrais espérantistes chrétiens devrait posséder pour l' une et l' autre de ces deux appartenances. C' est en plus d' une possibilité d' instruction personnelle un excellent outil d' information et de propagande éventuelles chez les autres". R. Olivaux.

=====

LA ROMANO DE CROY (tiun rakonton sendis nia nederlanda ano B. Brans, kiu resumis libron eldonitan de la episkopejo en Bois-le-Duc)

Joanna Carolina Wilhelmina van der Bruggen naskiĝis en 1795 en Utreĥto kaj estis la lasta mastrino de la kastelo en Croy. Ŝia patro naskiĝis en 1752 en Colombo sur insulo Cejlono, tiam nederlanda posedaĵo. Ŝi mem nomis sin F-ino Constans. Ŝi estis protestanta kaj tre klera, legis francajn, germanajn, anglajn, italiajn kaj hiapanajn librojn, sed ne temis pri la plej edifaj. En tiu tempo, la nobeloj ankoraŭ parolis pri Voltaire "ce joli petit garçon". Ankaŭ F-ino Constans en sia junaĝo estis tre liberala kaj neniam invitis protestantan pastoron ilominee al sia kastelo. Tamen, kiam ŝi iĝis pli aĝa, ĉio aliĝis kaj ŝi iĝis bonkora, amata mastrino. Ĉar ŝi loĝis en tute katolika medio, ŝi deziris katolikan servistaron kaj ke ŝi bone plenumu siajn katalikajn devojn. Sed, "kun kiu vi festas, tia vi estas", diras proverbo; ĉifoje estis "fariĝas". Inter ŝia servistaro estis iu bierfaristo, kiu sentime kaj rekte kuraĝis diri al ŝi la veron. "Ŝi revenos kiel tineo al la lampo", li pensis. Kaj efektive, ŝi ekŝatis tiun sinceran, iom krudan bonulon. "Viaj parencoj ĉion heredos de vi, sed ne preĝos por vi, mi preĝos por vi",

li diris. Li eĉ donis al ŝi kateĥismon, kiu ĉiam kuŝis sur ŝia tablo, sed se neatendite venis aristokrata vizitanto, ŝi rapide forigis ĝin. De katolika nobelo, amiko de sia frato (kavaliro van der Schueren), ŝi ricevis libron "L' éternité s'avance et on n' y pense pas". Precipe la morto de ŝia plej aĝa servisto, kum kiu ŝi havis tiom da amuzo, profunde impresis ŝin. Ŝi tamen havis kontraŭmotivojn, kaj la unua irado al katolika pastro estis "peza". Ŝi ne volis disiĝi de siaj parencoj kaj ankoraŭ ne sciis, ke la katolika eklezio ĉiam instruis, ke ankaŭ nekatolikoj povas beatiĝi, se ili bonafide kredas kaj konforme kondutas. Ŝiaj parencoj forte kontraŭstaris koncerne la heredaĵon, ĉu Croy post ŝia morto iĝos monaĥinejo? Oni moke parolis pri "tiu bierfaristo kaj la Fraŭlino" kaj ankaŭ la protestanta pastoro de la proksima vilaĝo Nuenen estis tre malkontenta. Ŝia servisto, la bierfaristo aŭdace diris, ke ŝi ne volas aŭ timas pro la parencoj. "Se vi kuraĝas, donu al mi la manon", li diris kaj tion ŝi faris. Kompreneble tio vekis ĉe ŝi multan maltrankvilon, sed fine ŝi venigis al la kastelo la maljunan paroĥestron de Stiphout. La historiisto notas: "La feltaj pantofloj de la paroĥestro glitis de lia varmakva piedstufo, li ekstaris, forlasis la fornon, apud kiu restis nur seĝo kun malfermita preĝlibro... kaj la varmigita kaleŝo de la Fraŭlino sekure kondukis lin al Croy (daŭrigota)"

+++++

EL AMERIKO

"Pere de amikino, mi partoprenas de tempo al tempo semajnfinojn, nomitan "thérapie de groupe". La plej forta sperto okazis en oktobro, kiam la partoprenantoj teatroludis scenon de la infanaĝo. Mi miris pri la krioj, larmoj kaj ĝemadoj aŭdeblaj en la diversaj ĉambroj. Venontsemajne, la grupo pasigos multe da tempo en varma akvo".

Mi respondis, memorigante Moon kaj la homojn, kiuj mortis en Gujano. Li respondis: "La emocioj profitas el tiuj renkontoj en kiuj oni estas libera paroli, kii aŭ paroli laŭ sia instinkto..."

Kosto por mi de tiu semajnfino ekvivalentas al triono de mia semajna salajro. Grave estas, ke el ĉiu semajnfino mi akiras novajn amikojn, kaj per tio mia vivo iom post iom prosperas".

Sendis X. Dauchez.

+++++

KOTIZTABLELO 1980

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 52 F  
 Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

\*\*\*\*\*

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 15 F  
 Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . 7,50 F  
 Bonfaranto . . . . . 75 F  
 Dumviva membro . . . . . 300 F

-----  
 UFE kun "Revue Française" . . . . . 90 F  
 UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 120 F  
 -----

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 36 F  
 Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 3ème trimestre 1980 !! Polycopié par F.M.C.  
 Papier de presse n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
 Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE